# Kiel organizi Esperanto-kurson

kaj havi multajn kursanojn...

Felix ZESCH, Berlin, Germanujo

# Strukturo

- La celo de Esperantokurso
- Organizaj pripensoj antaŭ la kurso
- Varbado por la kurso
- Organizado dum la kurso

- Post la kurso

# Kio estas la celo de Esperantokurso?

- Pligrandigi la nombron de Esperantoparolantoj
- Instigi kursanojn al utiligado de Esperanto

# Strukturo

- La celo de Esperantokurso
- **Organizaj pripensoj antaŭ la kurso**
- Varbado por la kurso
- Organizado dum la kurso

- Post la kurso

# Kio necesas por Esperantokurso?

Komuna tempo, en kiu disponeblas

- Lernantoj
- Instruisto
- Kursejo

# Tempo: Semajnfino aŭ semajntago

Konsiderendas diversaj aspektoj:

- Devenlokoj de la (eblaj) partoprenantoj
- Nombro de paŭzoj por
  - Plibonigi la grupan etoson inter kursanoj
  - Informi pri propraj spertoj en Esperantujo
- Verŝajneco, ke homoj dum la kurso perdas emon
- Ebleco maltrafi lecionon
- Vekeco kaj lernpovo de la lernantoj dum la kurso

→**Rekomendo estas organizi semajnfinan kurson**

# Temposkemo por semajnfina kurso

- Vendredo (20.30-22.30)
  - Sinprezento kaj interkono
  - Montrado de la filmo „Esperanto estas...“ de e@i
  - Diskuto
- Sabato (10.00-18.00)
  - Kurso kun paŭzoj kaj komuna manĝo
  - Vespere laŭ deziro de partoprenantoj komuna distra programo
- Dimanĉo (11.00-17.00)
  - Kurso kun paŭzoj kaj komuna manĝo
  - Informo pri Esperanto-aranĝoj

# Fiksi la daton de la kurso

- Laŭeble frue, por ke homoj povu adapti planojn
  - Rekomendo: Pli ol du monatoj antaŭ la kurso
- Enplekti interesatojn en la datfikso per *Doodle*
  - Sendi enketon al interesatoj per retpoŝto
  - Publikigi la ligilon en interretaj forumoj
  - Atendi respondojn dum unu aŭ du semajnoj
- Atenti pri disponebleco de la instruisto kaj ejo

# Kio necesas por Esperantokurso?

Komuna tempo, en kiu disponeblas

- **Lernantoj**
- Instruisto
- Kursejo

# La celgrupo de la kurso

- Homoj de ĉiu aĝo volas lerni Esperanton
- Ili diversas laŭ
  - Lernpovo kaj lernrapideco
  - Kleriĝnivelo
  - Entuziasmo pri Esperanto
  - Tempo por lernado kaj utiligado de Esperanto
  - Mono por subteno de la Movado
- Kursanaro el similaj personoj havas pli grandan harmonion kaj lernsukceson.
- Kiun celgrupon ni ĉefe privarbu?

# Kiom da homoj partoprenu en kurso?

- Ofte la problemo estas, ke entute ne troviĝas kursanoj.
- Anonci limigon de la nombro de partoprenantoj bonefikas por la kursano
  - Aliĝo estas sukceso
  - Certeco pri sufiĉa tempo de la instruisto
- La kursejo mem ofte jam limigas la kvanton

# Prezo de la kurso

- Kurso estu pagenda por...
  - Kovri la kostojn
    - Lupago kaj hejtkostoj, biletoj por kursestro kaj helpantoj, frandaĵoj, trinkaĵoj, kopioj, varbiloj
  - Doni la imagon de kvalito
  - Enspezi monon por posta agado kaj varbado
- Ĉiam eblu rabato por malmultpagipovuloj
- Laŭsperte bona prezo en Germanujo
  - 30 € por homoj malpli aĝaj ol 27
  - 50 € por homoj pli aĝaj ol 27

# Organizi tranokteblecojn por eksterurbanoj

- Bonus oferti en la varbilo malmulte- aŭ sen-kostan tranokteblecon por eksterurbanoj
- Diversaj eblecoj
  - Ĉe Esperantoparolantoj en la urbo (inkluzive vin)
  - En la kursejo kun dorsosako
  - Rekomendo de malmultkosta tranoktejo kaj rabato

# Adreslisto de la aliĝintoj

- Necesa por superrigardo kaj organizado
- Mastruminda cifere per tabelo
  - Unuloke sur propra komputilo (OpenOffice)
  - Ennube deie retumile (GoogleDocs, Zoho Writer)
- Enhavu almenaŭ
  - Nomo, retpoŝtadreso, telefono, naskiĝjaro, antaŭscio, jam pagis (kiom)

# Kio necesas por Esperantokurso?

Komuna tempo, en kiu disponeblas

- Lernantoj
- **Instruisto**
- Kursejo

# Instruisto

- Necesas

- Pri utilaj (sed ne nepre necesaj) kvalifikoj informiĝu ĉe Zsófia

# Trovi kursejon

- Kondiĉoj tre varias laŭ urbo
  - *Facile*: Ekzistas dediĉita Esperanto-kulturejo
  - *Meze*: Ekzistas renkontiĝejo de loka grupo
  - *Malfacile*: Necesas kontakti kaj negoceti kun lernejoj, universitatoj, monaĥejoj
- Ĉiam eblas lui seminariejon en junular-gastejo aŭ hotelo, sed plialtiĝas kostoj

# Strukturo

- La celo de Esperantokurso
- Organizaj pripensoj antaŭ la kurso
- **Varbado por la kurso**
- Organizado dum la kurso

- Post la kurso

# Varbado por la kurso

- Rete
  - Kursa retpaĝo
  - Rekta retmesaĝo
  - Kursdatumbazo
  - Sociaj retoj
  - Aliaj retejoj
  - Aliaj organizoj
- Papere
  - Afiŝo
  - Membrogazeto
  - Urba gazeto
- Persone

# Retpaĝo por la kurso

- Necesas.
- Enestu:
  - Titolo: Esperantokurso en [via urbo]
  - Dato, horaro, loko, prezo de la kurso
  - Adreso je kiu eblas aliĝi aŭ formularo
  - Kontaktdatumoj por pliaj demandoj
  - Nivelo de la kurso (ekz. por komencantoj sen antaŭscio)
- Aldonindas:
  - Ligiloj al informoj pri Esperanto ĝenerale, ekz. en la paĝaro de via landa sekcio.
  - informoj pri la antaŭkurse traleginda materialo
  - aliĝformularo por montri profesiecon (kaj helpas vin organizi cifere)
  - raporto pri pasintaj kursoj kun artikoletoj kaj fotoj de partoprenintoj
  - indikoj pri kiel organiĝos manĝado
    - eblas formulare demandi pri dietoj aŭ limigoj en manĝado kiel ekz. alergioj aŭ vegetaraneco
- Facila ebleco por krei kurspaĝaron sen scio pri retteĥnikoj estas GoogleSites
- Se vi kreas mem paĝon, certiĝu, ke ĝi bone troveblas per serĉiloj

# En sociaj retoj

- Multaj homoj, ĉefe malpli aĝaj ol 40, anas en sociaj retoj
- Tie eblas varbi en forumoj (Esperanto-grupo) kaj per afiŝeblaj eventoj



# Retmesaĝo al distanckursanoj

- Per retmesaĝo post datofikso
  - Plia post du semajnoj au semajno antau la kurso
- GEJ povas kontakti anojn de
  - Brazila Kurso
  - KEK
  - Lernu.net
- Simple skribu la necesajn informojn al bero@esperanto.de

# Datumbazo de Esperantokursoj

- Ekzistas centraj datumbazoj kiuj donas superrigardon pri Esperantokursoj
- Interesatoj serĉas eble en ili
- Iliaj datumoj povas afiŝiĝi en aliaj retpaĝoj

- Bonas do enskribi la kurson ĉe
  - EsperantoLand.org - referencita en GEJ-paĝaro
  - Edukado.net

# Varbi en aliaj retejoj

- Enirpaĝo aŭ novaĵoj de via landa sekcio
- Enirpaĝo aŭ novaĵoj de via loka grupo
- Senkosta anonco ĉe www.viaurbo.kijiji.de

# Konatuloj de organizitaj Esperantistoj


- Ofte eblas informi rete la membrojn de via landa sekcio pri la kurso
- Ili povas informi konatulojn
- Bonas limigi la ricevantaron al proksime loĝantaj

- Por realigi tion, necesas kontakti la membroadministranton de via landa sekcio

# Varbi afiŝe

Eblas en multaj lokoj:

- Antaŭ la renkontiĝejo de la loka grupo
- En studentaj hejmoj
- En loĝkomunumoj
- En lernejoj
- En kafejoj, kebabejoj




Utile: Forŝireblaj slipetoj kun informoj

# Anonco en urba gazeto

- En urbaj gazetoj eblas malaltpreze meti anoncon
  - Berlin: Fritz, Zitty, TIP, 030
  - En aliaj urboj per similaj gazetoj
- Eblas financi la anoncojn per enspezoj el okazonta aŭ okazinta kurso

# Informo en la landa sekcio

- Anonci la kurson nepre en la dissendolistoj
- Membrogazetoj de loka klubo aŭ landa sekcio ankaŭ atingas interesatojn
  - indas anonci la kurson tie
    - se vi sufiĉe frue planis la kurson kaj
    - Se la gazeto ĝustatempe aperas

# Aliaj organizoj

- Informu asociojn kun bonaj rilatoj al Esperanto
  - Bahai
  - Germanio: Samseksemulaj junuloj (lambda)
  - Verduloj, socialistoj, komunistoj, piratoj
  - Vegetaraj grupoj (ekz. Deutsche Reformjugend)

# Persone

- Eblas prelegi kaj informi surstrate
- Multa laboro kompare al „amasa agado“
- Utilas ĉefe, se la medio estas tre interesata

# Strukturo

- La celo de Esperantokurso
- Organizaj pripensoj antaŭ la kurso
- Varbado por la kurso
- **Organizado dum la kurso**

- Post la kurso

# *Informa* kaj interkona vespero 1/2

- Bonas informi la kursanojn pri Esperanto kaj Esperantujo.
- Malfacilas informi en mallonga tempo pli bone ol per la filmo „Esperanto estas“
- Por montri ĝin necesas dvd-ludilo kaj preferinde projekciilo



# Informa kaj *interkona* vespero 2/2

- Por krei grupan etoson necesas, ke la homoj interkonatiĝu
- Komence sufiĉas, ke la homoj sinprezentu
  - Aĝo / devenloko
  - Kiel eksciis
    - pri Esperanto
    - Pri la kurso
  - Kiujn lingvojn parolas
  - ...
- La vere interkonatiĝo okazos poste en la paŭzoj kaj dum la ekzercoj

# Ofertoj dum la kurso

- Keksoj kaj fruktoj
- Trinkaĵoj
- Esperanto-objektoj
  - T-ĉemizoj
  - Libroj
  - Lumdiskoj kun Esperantlingva muziko

# Manĝo: Ĉu mem kuiri aŭ ien iri?

| | **Mem kuiri** | **Ien iri** |
|---|---|---|
| **Avantaĝoj** | • pli malmultekoste<br>• Ofte bone por la etoso | • ĉiu povas mem elekti ion laŭ sia gusto<br>• irado el la domo povas boni, ĉar distras |
| **Malavantaĝoj** | Necesas<br>• Manĝilaro (kaj eble lavi ĝin poste)<br>• antaŭa aĉetado<br>• kuiristo<br>• Decido pri manĝaĵo taŭga por ĉiuj | • tempo por irado kaj mendado forprenas aldonan tempon por la kurso<br>• pli multekosta |

# Strukturo

- La celo de Esperantokurso
- Organizaj pripensoj antaŭ la kurso
- Varbado por la kurso
- Organizado dum la kurso

- **Post la kurso**

# Resuma retpoŝto

- (Enketo pri la) Dato de sekva kurso
- Sekvaj taŭgaj aranĝoj
- Ligiloj al
  - e-libroj
  - Esperanto-muziko
  - Enketo pri la kvalito de la kurso
- Informoj pri membriĝo en landa sekcio
- Informoj pri dissendolistoj
- Informoj pri la loka Esperanto-vivo

# Kolekti opiniojn pri la kurso

- Enketo
  - Taŭgas
  - Facilas
  - → Utiligindas

- [Ekzempla enketo]

deutsche esperanto-jugend e. v.
germana esperanto-junularo r. a.

dej

**Auswertung des Esperantokurses**

**vom 11. bis 13. Juni 2009**

**im Esperanto-Haus in Berlin**

**Kursleiter**: Felix Zesch

**Helfer**: Thomas Würfel, Olga Besova

**Lehrmaterial**: "Esperanto en Dialogo", "Pack Es – Esperanto in der Tasche"

**Teilnehmer**: 11



# Instigi kursanojn al utiligado

- Ĉefa celo de utiligado estas partopreno en renkontiĝo
- Ĉefa malhelpilo estas timo
  - Ne povi interparoli tie
  - Esti sola novulo sen amikoj

- Necesas forigi tiujn timojn...

# Rimedoj por interamikigi kursanojn

- Esperanto-vesperumado
  - Esperanto-muziko
  - Progresintoj
  - Kursanoj
  - Frandaĵoj kaj trinkaĵoj

- Invito al aktivaĵoj de la loka grupo
- Komuna veturado al Esperanto-renkontiĝoj
  - Certigi, ke novula programo ekzistas

# Regule alskribi iamajn kursanojn

- Pri aktiveco de loka grupo
- Pri sekvaj taŭgaj Esperanto-aranĝoj
- Pri sekvaj Esperanto-kursoj (ili ankaŭ povas varbi)
  - Vojaĝkostsubvencio de GEJ

# Raportoj pri la kurso

- En gazeto
  - Per redakcio artikolo
  - Laŭ gazeta komuniko
- En la retpaĝo de via loka grupo
- En la membrogazeto de via landa sekcio

→Fundamento por pliaj kursoj

*Eĉ guto malgranda, konstante frapante,*
*traboras la monton granitan.*

**Kiel organizi Esperanto-kurson kaj havi multajn kursanojn**

- La celo de Esperantokurso
- Organizaj pripensoj antaŭ la kurso
- Varbado por la kurso
- Organizado dum la kurso
- Post la kurso

Dankon pro
Via atento!